# TELOPEO

Oficiala Organo de La Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo

*Volumo 52, Numero 11-12, Novembro-Decembro 2018*

**Esperanto Domo, 143 Lawson St, Redfern, Sydney NSW 2016, Aŭstralio**

**Redaktoro: Dmitry Lushnikov, Provleganto: Nicole Else**


## La Zamenhof Festo 2018




La Zamenhof Festo 2018 okazos la 15-an de decembro je la 12-a en Esperanto Domo de Sidnejo.

Programo de la festo:

12:00 - 12:30 ptm - Malfermo, prelegoj de niaj gastoj

12:30 - 1:00 ptm - Skajprenkontiĝo kun E-klubo el Japanio kaj Koreio

1:00 - 1:30 ptm - koncerteto de Milada Kondratieva

1:30 - 2:30 ptm - komuna tagmanĝo, babilado

3:00 - 4:00 ptm - E-leciono por komencantoj

## Recenzo de "Complete Esperanto"

*Jonathan Cooper, Prezidanto*

Kiam mi eklernis Esperanton en 1970, interretaj kursoj kompreneble tute ne ekzistis. Por lerni lingvon, oni aŭ lernis vizaĝ-al-vizaĝe de instruisto aŭ uzis libron (eble kun akompananta vinila disko por prononcado). Ĉar mi tute ne sciis, kie trovi iun, kiu povus instrui, aŭ eĉ paroli, Esperanton, mi lernis el libro, specife Esperanto de Cresswell kaj Hartley (2-a eldono, 1968), unu el la fama serio Teach Yourself Books. La metodo estis tradicia sed sufiĉe efika. Ĝi instruis gramatikon, sed sen ŝarĝi min tro frue per gramatika terminologio aŭ tro multaj konceptoj. Aliaj libroj uzas ĉi tiun bazan metodon, kun diversaj gradoj de sukceso, inkluzive de Step by Step in Esperanto de Butler kaj The Esperanto Teacher de Stuttard. Aliaj libroj uzis la "rektan" metodon, per kiu ĉiuj (aŭ plejparto) el la materialo estas en Esperanto. Unu tia libro, kiun mi poste uzis kiel lernolibro kune kun lecionoj ĉe Esperanto-Domo en Sidnejo en la 1980-aj jaroj, estis la ofte amuza A practical course in Esperanto de Szilágyi.

Nun nova libro, Complete Esperanto de Tim Owen kaj Judith Meyer, eldoniĝis. Kvankam eldonita sub la nomo "Teach Yourself", ĝi tute ne estas ĝisdatigita versio de la antaŭa verko de Cresswell kaj Hartley. En dek ok ĉapitroj, plus gramatika resumo kaj baza vortprovizo (Esperanto al la angla kaj inverse), ĝi donas al la leganto la eblecon progresi de vera komencanto al iu kun meza flueco (nivelo B2 de CEFR: Komuna Eŭropa Kadro de Referenco por lingvoj).


La libro uzas ion, kion la verkistoj nomas "Discovery method" (Malkovran metodon), kiu signifas, ke la legantoj estas kuraĝigataj malkovri signifojn kaj skemojn per si mem, por ke ili retenu pli da tio, kion ili lernis. Ĝi ankaŭ havas akompanajn sondosierojn, kiujn oni povas aŭskulti interrete, aŭ per la apo Teach Yourself.

Post Leciono 5 de la originala Teach Yourself Esperanto de Creswell kaj Hartley, estas la jenaj frazoj: "Imagu, ke unu bonan tagon vi prenas vian matenan gazeton kaj eltrovas, ke ĝi tute transformiĝis en Esperanton! Ĉiu posta leciono uzos kiel bazon tipan artikolon prenitan de ĉi tiu imaga gazeto..." Kiel alloga estas ĉi tiu revo—ke Esperanto estas adoptita kiel lingvo por ĉiutaga uzo—Owen kaj Meyer sekvas alian metodon. Multaj ekzemploj en la libro uzas realan Esperanto-kulturon kiel la kuntekston, ekzemple Universalajn Kongresojn. Fakte, ĉi tio provizas iom el la humuro de la libro. Ekzemple, sur paĝo 242, oni petas la leganton traduki la jenajn frazojn ("kiuj povus esti utilaj dum via sekva Esperanto-Kongreso"!) en Esperanton:
a. I don't like the rhythm and melody of this song.
b. It's too loud.
c. The guitarist is awful.
d. I would prefer to listen to the other singer.
e. It would be quieter somewhere else.
f. I'd avoid this concert; he sings terribly.
g. Sorry, I misheard because of the noise.*

Tra la libro estas multaj konsiloj pri Esperanto-kulturo, multaj utilaj esprimoj kaj multaj eblecoj por la leganto ekzerci kaj provi esprimi sin.
Unu ebla problemo por iuj legantoj estas, ke la sondosieroj foje estas ne nur helpaj sed necesaj: iuj el la ekzercoj fakte postulas aliron al ili.
Tamen, ĉi tio estas plejparte bonega enkonduko al Esperanto kaj Esperantujo por komencanto, kaj havinda ilo por iu ajn, kiu deziras profundigi sian scion de la lingvo.

**Du ekzempleroj de Complete Esperanto estas nun en la Federacia biblioteko ĉe Esperanto-Domo. Do, kiel membro, vi povos prunti ĝin senpage dum daŭro de maksimume kvar semajnoj.**

Complete Esperanto
Verkis: Tim Owen kaj Judith Meyer
Eldonis: Teach Yourself (Hodder and Stoughton), Britio, 2018
ISBN: 97881473669185




*a. Mi ne ŝatas la ritmon kaj melodion de ĉi tiu kanto.
b. Estas tro laŭte.
c. La gitaristo estas aĉa.
d. Mi preferas aŭskulti la alian kantiston.
e. Estus pli trankvile aliloke.
f. Mi evitus ĉi tiun koncerton; li kantas aĉe.
g. Pardonu, mi misaŭdis pro la bruo.

## Gasto el Germanio



Baldaŭ ni havos gaston el Germanio: Dr Rainer Kurz. Li partoprenos la Zamenhof Feston kaj prelegos pri vojaĝo en Svislando. Rainer loĝas en Stuttgart. De 1999 ĝis 2001 li estis prezidanto de Germana Esperanto-Asocio (GEA). Nun li estas estrarano de GEA (pri eksteraj rilatoj) kaj de IKEF. Rainer Kurz doktoriĝis pri telekomunikado en Stuttgart/Germanio kaj Kitakyushu/Japanio kaj laboras kiel memstara firmaokonsilisto en sia firmao Rainer Kurz Business Consulting. Li ankaŭ estas interreta entreprenisto. Inter alie, li kreis kaj licensigis interretajn merkatojn por liberaj profesiuloj laŭ la nomo de Freelance-Market en diversaj landoj (Germanio, Aŭstralio, Ĉeĥio, Ĉinio, Novzelando).

## Membrokotizoj

Dankon al ĉiuj kiuj estis membroj en 2018. La 2019 jaro komencĝios baldaŭ. Bonvolu ne prokrasti kaj remembriĝu. Iru al esperantohouse.org.au/about-us/join. Ni akceptas pagon per kreditkarto, PayPal aŭ ĝiro.

EFNSW: Esperanto Domo, Unua Dimanĉo de la monato 11:00 ĝis 13:00
Por ĉiuj senpaga manĝeto, Esperanto Domo , Unua Dimanĉo de la monato 13:00 ĝis 15:00
Kontaktu Jonathan Cooper 0403 358 941

Manlia Esperanta Klubo ĉe Bavarian Beer Cafe, Manlia Kajo
1a kaj 3a Sabatoj; 10:00 atm; Komencantoj Bonvenaj
Kontaktu Roger (02) 9976 6320 *manly@esperanto.org.au*

La Meza Marborda Grupo; 3a Dimanĉo de la monato; kontaktu Joanne (02) 4362 8287
Novkastelanoj: Kontaktu Andrew (02) 4951 2084 *newcastle@esperanto.org.au*

La Suda Marborda Grupo; malgranda grupo kunvenas foje je Bega.
Komencantoj Bonvenaj. Penny Vos (02) 6495 2922

Esperanto-Kafo-Klubo de Kanbero Jaŭde 17:00 la Capital Pancakes, 122 Alinga St.,Civic. Huigh 02 6288 4334 *huighm@gmail.com*


La Esperanto Federacio de Nova Sud-Kimrujo: Esperanto Domo,
143 Lawson St, Redfern 2016 (02) 9319 4775;
Malfermata ĉiun merkredon, 15:00 – 17:00
*(Sonigu elektran zumilon ĉe la strato)*
www.EsperantoHouse.org.au
retadreso: *nsw@esperanto.org.au*




| | |
|---|---|
| Prezidanto: | Jonathan Cooper |
| Vic-prezidanto: | Andrew Spannenberg |
| Sekretario: | Nicole Else |
| Kasisto: | Dmitry Lushnikov |
| Estrarano: | Alan Turvey |

# amikumu

Amikumu estas apo (poŝtelefona aplikaĵo), kiu helpos vin trovi kaj kontakti proksimajn esperantistojn – ĉiam, ĉie!




Esploru profilojn kaj esprimu vin

Trovu esperantistojn apud vi ĉiam, ĉie

Konatiĝu kaj renkontiĝu!

Elŝutu Amikumu
iPhone 4S aŭ iPad 2+:
Android (OS 4.0.3+):

La utileco de tia aplikaĵo por esperantistoj estas klara, iusence ĝi estas ĝisdatigo de la plej malnova servo de UEA, la Delegita Reto, kiu same celis plifaciligi kontaktojn inter homoj dum vojaĝoj aŭ pri komunaj interesoj.
– Mark Fettes, la Prezidanto de UEA

En Londono, mi trovis esperantiston apude per Amikumu kaj ni renkontiĝis tutsimple tiel.
Mi apenaŭ povas atendi por uzi ĝin denove!
– Orlando Raola, Prezidanto de Esperanto-USA

## Por disvastigi Amikumu

Plusendu ĉi tiun flugfolion al ĉiuj konatoj per retpoŝto, fejsbuko kaj tvitero.
Plusendu ĉi tiun flugfolion al la organoj de via loka movado.
Printu ĉi tiun flugfolion kaj diskonigu ĝin ĉe via loka klubo.

Se vi volas kontakti la teamon de Amikumu pri gazetaj anoncoj aŭ demandoj, bonvolu retpoŝti nin ĉe

info@amikumu.com
amikumu.com
www.facebook.com/amikumuapp

La Oficiala Sponsoro de Amikumu estas la Universala Esperanto-Asocio